numero 97

aprilo 2009

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Elekto de estraranoj okazos perpoŝte

Dum la ĉijara universala kongreso okazos nur informkunveno. La (re)elekto de la estraranoj okazos perpoŝte. Detalojn vi legos en ĉi tiu numero kaj en la rubriko 'aktuale' de www.ikef.org.

## Enhavo

Kalendaro por la elekto de estraranoj ........................ 3
Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2009 ................ 4
Financa raporto de IKEF pri la jaro 2008 .................... 4-6
Proponoj por 2009 ........................................ 5
Novaj membroj ........................................ 7
Nova adreso (Harald Schicke) .............................. 8
Komercaj proponoj ...................................... 8-9
Artikolo pri Esperanto kaj kompanio Triballet (Francio) ....... 10
Seminario "Apliko de Esperanto en la faka kaj profesia agado" 11-12



**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas duonjare [kvaronjare ĝis 2005] ([jan]-apr-[jul]-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland ROTSAERT. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; D-ro Achim HORNECKER; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco POLERANI.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio, tel/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)telenet.be.

La jara **membrokotizo** ekde 2008 estas 10 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 5 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj') (aŭ egalvaloro en konverteblaj valutoj). Kotizo estas por la kalendara jaro. Membro kiu aliĝas dum la jaro pagu proporcie pli ĝis la fino de la posta jaro. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo.

**Kontoj**:
- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- www.moneybookers.com (konto=retadreso de la kasisto)
- per banko: petu kontoinformon de la kasisto

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Brazilo:* Silvio KNIESS MATES (silvio(a)davincibrasil.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

Ĉ*inio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)wanadoo.fr

*Hungario*: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, paloc1(a)inbox.com

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

*Kroatio*: S-ro Vjekoslav MORANKIĆ, Lipa 40 E, HR-51000 RIJEKA, retpoŝto esperanto.rijeka(a)ri.htnet.hr.

**IKEF-informoj en Interreto**: www.ikef.org

**Kalendaro por la elekto de estraranoj**

Ĝis nun neniu estrarano konfirmis ke li partoprenos la ĉijaran universalan kongreson en Pollando. La kasisto ne estos (kaj tre verŝajne ankaŭ ne estos en la venontjara UK). Tial dum la kongreso okazos nur informkunveno anstataŭ oficiala ĝenerala kunveno. Ĉar IKEF ne havas aktivan membron en Pollando, malfacilos organizi iun ekskurson por la IKEF-anoj dum la kongreso. IKEF ne partoprenos en la tradicia movada foiro je sabato.

Laŭ artikolo 7.4 de la statuto, la aprobo de la jarraportoj okazas aŭtomate se ene de du monatoj post publikigo ne pli ol duono de la membraro malaprobas ĝin. Por tio do ne estas bezonata iu proceduro.

La elekto de estraranoj okazos per poŝta voĉdono. La estraranoj Hornecker, Kniess Mates, Ooba kaj Rotsaert atingas la finon de sia dujara oficperiodo. Je redaktofino, ĉiuj kvar anoncis ke ili rekandidatiĝas. Tamen, Hornecker verŝajne ne estos en la UK; Rotsaert ankaŭ ne estos kaj volonte transdonos taskojn (membroadministradon, revuon, retpaĝon, financojn) al aliaj estraranoj; li ja profesie tute ne plu havas rilatojn kun komerco. Ooba okaze de lia rekandidatiĝo skribis ke il 'iel volas apliki Esperanton al komercaj aferoj'.
Laŭ la statuto la estraro konsistas el Prezidanto, Ĝenerala Sekretario, kaj du ĝis kvin aliaj estraranoj, inter ili Vicprezidanto kaj Financa Konsilanto (= kasisto).

Jen la kalendaro por la elektoproceduro:

- 20 marto 2009: forsendo de La Merkato kaj aperigo de ĉi tiu kalendaro en la rubriko 'aktuale' de www.ikef.org.

- 10 majo 2009: limdato por kandidatiĝi kiel estrarano.

- 20 majo 2009: aperigo de la listo de kandidat-estraranoj en la retpaĝo kaj starto de la voĉdonado.

- 20 junio 2009: fino de la voĉdonado kaj aperigo de la rezultoj en la retpaĝo.

La kandidat-estraranoj kaj la voĉdonantoj skribu rete al ikef(a)telenet.be aŭ papere al Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio.



**Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2008**

Dum la universala kongreso de Rotterdam okazis la kutimaj IKEF-aranĝoj. Je la 20a de julio la ĝenerala kunveno aprobis la raportojn pri la antaŭa jaro, reelektis la estraranojn Kurz kaj Wang, kaj fiksis la jarajn kotizojn je 10 eŭroj (por membroj el UEA-landokategorio A) kaj 5 eŭroj (por kategorio B). Je la 24a de julio 25 personoj vizitis la havenan ĉefoficejon; tiu vizito estis preparita de nia nederlanda membro Kees Ruig.

La IKEF-revueto 'La Merkato' aperis dufoje. Menciendas ke, eĉ por du anstataŭ antaŭe kvar numeroj, malfacilas trovi interesajn kontribuojn. Bonvenus i.a. pli da tekstoj de aktivaj komercistoj.

La retpaĝoj de IKEF (je www.ikef.org, www.ikef.net, www.ikef.info) estis regule ĝisdatigitaj, sed entuta reverko de la paĝoj iam necesos. IKEF sukcesis akiri kaj mem mastrumi la ĉefan adreson www.ikef.org, kiu dum periodo ne uzeblis. Indas demandi sin ĉu la 'rezervaj' .net kaj .info ankoraŭ bezonatas.

La esperantlingva forumo de IKEF estis nuligita sen antaŭa averto. Provizore anstataŭas ĝin anglalingva versio, sed tio ne estas kontentiga solvo. Provoj por krei novan esperantlingvan forumon ĝis nun ne donis rezulton. Apud la forumo ankaŭ ekzistas kelkaj Yahoo-diskutgrupoj. Estis kreita unu nova Google-grupo (http://groups.google.com/group/komerco/), kiu teknike estas pli avangarda kaj pli facile uzebla. Nun la membroj estas transirantaj al la nova grupo; meze de marto ĝi havis 50 membrojn. Ambaŭ komunikiloj (forumo kaj diskutgrupo) havas siajn avantaĝojn kaj povas kunekzisti.

La cetera aktivado de IKEF estis malgranda. Ne estis projektoj pri terminologio aŭ eldonoj; en la revuo Monato nur aperis malmultaj gravaj artikoloj pri ekonomio kaj tute ne aperis komercaj anoncoj en ĝi. La membronombro stagnas je ĉ. cent. Esperiga estas la kresko de la nombro de dumvivaj membroj ĝis dek.

**Financa raporto de IKEF pri la jaro 2008**

***La ciferoj troviĝas je p. 6. D-ro G. Polerani, revizoro de IKEF, kontrolis kaj aprobris la ciferojn je la 6a marto 2009.***

Post multaj jaroj kun pozitiva saldo, la spezokonto pri 2008 montras malgajnon de 79,63 eŭroj. Estis antaŭvidita ke tio iam okazos, pro la malmulta agado de IKEF kaj pro ĝia iom post iom falanta membronombro. Du konkretaj, kvankam etaj kialoj estas la malpli granda sumo de ricevita rento kaj la manko de venditaj eldonoj dum 2008.

Post forigo de la membroj kiuj lastfoje pagis kotizon por 2006 aŭ 2007 kaj ne reagis al memorigoj, nek donis alian vivosignon (ekzemple kompletigo de la reta adresaro), restas 110 membroj. Al dudeko da membroj kiuj same ne pagis kotizon, sed montris iometan aktivecon, estis sendita memoriga letero antaŭ nelonge.

Dum la pasinta jaro estis dek novaj aliĝoj; esperdona estas la fakto ke du ekzistantaj membroj iĝis dumvivaj membroj.

Pro la relative altaj kostoj kompare kun ĝia malofta uzo, kaj post interparolo kun la revizoro, la poŝtĉekkonto de IKEF estis nuligita. Pagoj al IKEF kiuj ne eblas tra la kontoj ĉe FEL, UEA kaj *Moneybookers* povas okazi tra la persona konto de la kasisto. Sekve de tio la 'kaso' havos pli grandan rolon en la IKEF-librotenado.

Malgraŭ la magraj enspezoj, restas sufiĉe da disponebla mono por garantii la funkciadon de IKEF dum pluraj jaroj kaj eĉ, se denove estus aktiveco tiurilate, financi iun (terminologian) eldonon.

## **Proponoj por 2009**

Atentopunktoj dum la jaro estu la kreo de esperantlingva forumo kaj transiro al la nova Google-listo, la kunmeto de kompleta kaj aktiva estraro, kaj daŭra stimulado de la uzo de la reta adresaro.

Pli longtempaj taskoj estas la ellaboro de novaj projektoj kaj la tuta reverkado de la IKEF-retpaĝoj.

Roland ROTSAERT



(en la papera versio ĉi tie estas la bilanco kaj spezokonto pri 2008)

## Novaj membroj

382. Roland Schnell, ˚1953, Kieler Str. 3, DE-10115 Berlin, Germanio; telefono +49 30 / 39 88 99 81, poŝtelefono +49 160 / 71 12 247, fakso +49 30 / 63 91 00 37, rete roland(a)graskraft.de, www.graskraft.de, kemiisto kaj konsultanto pri alternativa energio.

383. Arun Kumar Bhattacharyya, ˚1943, Flat 06, Swapnadeep Ap., DA 4/8 Shastri Bagan, Baguihati, 700059 KOLKATA, Barato, rete arun_b50(a)yahoo.com, tekstila tekniko, eksporto/importo.

384. Isaac K. Quartey, Migruijchas Business Ventures - Box MP 2206, Mamprobi, Accra, Ganao, tel. 0277855112 kaj 0285181840, rete niikwarte(a)gmail.com, www.bestonerev.com, komercisto.

385. Koadjo AMEVOR, ˚1958, s/c Mr. AZIABOR, B.P. 5718, Libreville, Gabono, telefono 0241.07.42.89.70,
rete amevorrovema(a)yahoo.fr, ŝtaplisto en konstruista socio.

386. Henriel FIDILALAO FIRAISANA, ˚1966, lot IAH 32 bis, AVARATSE-NA, MG 102 AMBOHIDRAPETO, Madagaskaro,
telefono +2612422134, poŝtelefono +261331126836,
rete fidilalao(a)yahoo.fr, www.esperanto-eksporto.com, lingvoinstruado, varbutikisto/eksportanto de malagasaj manartaĵoj.

387. Stano Marček, ˚1953, Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, telefono +421 43 4222788, poŝtelefono +421 905 438031, fakso +421 43 4222788, rete stano.marcek(a)gmail.com, www.uea.org/revuo/index.html, redaktoro, komercisto kaj eldonisto (origine elektroteknikisto, aŭtomatigaj teknologioj), kursgvidanto.

388. Jawaid Eahsan, ˚1966, P.O. Box 26, 60000 Multan, Pakistano, poŝ-telefono 0092-301-744 26 44, rete jawaid_eahsan(a)hotmail.com, studoj: ekonomio, angla.



## Nova adreso

185. Harald Schicke: nova retadreso info(a)ginseng-laden.de, nova poŝtadreso: Hauptstr. 38, 37412 Herzberg - la Esperanto-urbo, Germanio; telefono +49 5521 929468; retpaĝo www.ginseng-laden.de.

## Komercaj proponoj

### Ĉinio

Fondita en 2000, Yafod Internacia Limigita estas profesia kaj grava ajlo-eksportanto en Ĉinio. Ni havas nian propran ajlan produktadon, bazitan en Shandong, Ĉinio. Ni kolektas, procezas, pakas, storas kaj eksportas multajn milojn da tunoj da ĉina ajlo al la mondo tutjare. Dum multaj jaroj, ni akiris tutmondan reputacion por nia marko, Bela Ajlo. Ni certigas plej bonan kvaliton laŭ EEK Kat.1-normoj.

Ni pakas nian ajlon po 10 kg en kartonaj skatoloj aŭ en antaŭpakitaj maŝaj sakoj. Ni povas ankaŭ paki ilin en 20 kg maŝaj sakoj. Ni ŝarĝas ajlon ĉu en 20' FCL-ujoj kun unu pordo malferma, ĉu en 40' HQRF pli fridaj kun temperatura kaj humideca rego. Ni havas nian propran 8,000-tunan klimatizitan staplon el kiu ni eksportas.

Krom ajlo kaj ajlaj produktoj, ni ankaŭ distribas diversajn aliajn lokajn agrikul-turajn produktojn: zingibro, kapsiketo, spico, arakidoj, kaŝtanoj, pomoj, pomeloj, piroj, cepoj, faboj, tomata pasto kaj tiel plu.

Por pli da detaloj, bonvolu viziti http://www.prettygarlic.com aŭ skribu al szbizsz(a)gmail.com.

### Francio

Rigardu je http://www.fishroute.eu/ (multlingva, ankaŭ Esperanto, ĉina...) por trovi informojn pri la internacia fiŝindustrio. Rete: fishroute(a)orange.fr.

**Germanio**

Freelance-Market estas gvida Germana interreta merkatejo, en kiu firmaoj trovas profesiajn liberajn profesiulojn de preskaŭ ĉiu fako (ekz. programistoj, grafikistoj, inĝenieroj, ...).
*Freelance-Market* estis fondita de la germana esperantisto Rainer Kurz en 2004. Por internacie kreski, ni ĵus trovis licencprenanton en Aŭstralio. Nun precipe interesas nin perantoj en Francio, Hispanio kaj Usono. Bv. iru al www.freelance-market.com aŭ skribu al info(a)freelance-market.com se vi volas esti licencprenato por via lando aŭ via fako.

**Hungario**

*Lingvo-Studio* (Lingvo Szolgáltató Iroda Bt) (www.eventoj.hu, www.esperanto.hu), pk. 87; HU-1675 Budapest, Hungario, tel.: +36-1-282888-5, ofertas instruadon, eldonadon kaj entreprenajn servojn.
Eksterlande nia teamo estas konata kiel "Esperanto-Centro Eventoj".

1. Organizado de E-kursoj ĉeestaj kaj interretaj (vidu www.eszperanto-tanfolyam.hu/), Esperantaj servoj (libroservo, aranĝoj, novaĵservo, vortaro, ktp).
2. Profesia tradukado, ekonomika kaj entreprena konsilado, merkatiko, ekspertizoj.

Kontaktpersono: S-ro SZILVÁSI László, szilvasi(a)eventoj.hu.

**Slovakio**

Mi ofertas komercon kun ligno:
1. Lignon ekspulatitan en Slovakio. Ebla transporto per propraj kamionoj Scania R 420CB 6*6 kun EURO 3 kaj EURO 4, kun hidraŭlikaj manoj LOGLIFT F165ZT93A, LOGLIFT 265ZT95.
2. Ekspluatadon (kun elarbarigo kaj sekva transporto) de ligno en eksterlando: pretas veni du taĉmentoj de spertaj lignosegistoj kun du arbaraj traktoroj LKT 81 kaj LKT 82.

Interesiĝantoj kontaktu: Stano Marček, retadreso stano.marcek(a)gmail.com.



**Artikolo pri Esperanto kaj kompanio Triballat en entreprena ĵurnalo**

Legeblas en la ĵus aperinta februara numero de la franca loka ĵurnalo "Journal des Entreprises (Iles-et-Vilaine)", paĝo 8, artikolo kiu informas ke kompanio Triballat ĵus aĉetis italan kompanion *Integralimenti*, kiu estos nun sia unua eksterlanda filio. Skanita versio de la artikolo estas je:
http://www.linguaforce.com/triballat-va-utiliser-l-esperanto-avec-sa-filiale-italienne.jpg.

Apud tiu artikilo kuŝas kromartikolo kun titolo "Olivier Clanchin, promoteur de l'espéranto" (Olivier Clanchin, propagandisto de Esperanto). Jen la traduko en Esperanto:

*Interkomuniki kun ties eksterlandaj filioj pere de Esperanto. Jen la ja nekutima ideo de Olivier Clanchin. Ĉiam novigema, la prezidanto de Triballat ĵus starigis en urbo Rennes la asocion Entreprise-Espéranto. La celo de tiu cerbumgrupo estas instrui al ties teamanoj la bazojn de la universala lingvo. Tiu eksterordinaraĵo fareblas dank'al iu metodo freŝe kreita de fakuloj. "Ni testos ĝin kun laboristoj kaj teknikistoj en Italio". Se tio funkcias, Olivier Clanchin povos mem babili en Esperanto kun la italoj. Jam de unu jaro, li klopodas sin konservi iom da tempo por lerni la lingvon, kune kun familianoj!*

Triballat estas avangarda kompanio kiu estis inter la unuaj lanĉantaj t.n. "bio" (tute senkemiajn) nutraĵojn je industria skalo en Francio. La kompanio estis ankaŭ tre aktiva en la enkonduko de la normo AB (agriculture biologique) en Francion.

Prezidanto: Olivier Clanchin,
Vendosumo: 300 milionoj da eŭroj
1000 dungitoj
Plej konataj produktoj: SojaSun (www.sojasun.com), Vrai, Petit Billy...

Verŝajne dua artikolo aperos en la venontmonata numero de la ĵurnalo. Por ĉiuj kromaj informoj, aŭ se ankaŭ vi ĉiam sekrete revis esperantigi kompaniojn en via propra lando, bv. kontakti min.

Philippe Bérizzi
rete pberizzi(a)linguaforce.com, retpaĝo www.linguaforce.com

**Seminario “Apliko de Esperanto en la faka kaj profesia agado”**

(Karlovo, Bulgario 12-15.06.2009)

Unuafoje en Bulgario la estraranoj de BEA kune kun AIS-Bulgario, IUK kaj neesperantista organizo ”Scienc-Teknika Asocio” decidis organizi E-seminarion ne nur por esperantistoj, sed ankaŭ por la scienculoj kaj fakuloj kiuj ne parolas esperante.

Oficiala lingvo estos Esperanto sed laborlingvoj ankaŭ estos bulgara kaj la lingvoj de la scienculoj kaj fakuloj el diversaj landoj, kiuj ne estas esperantistoj sed partoprenos la seminarion kaj dezirus per Esperanto fari kontaktojn kun gekolegoj-fakuloj. Jam aliĝis famaj bulgaraj scienculoj, universitataj profesoroj, kiuj ne estas esperantistoj kaj kies prelegojn ni tradukos. Ili dezirus konatiĝi kaj kunlabori kun gekolegoj en diversaj landoj uzante Esperanton kiel kontaktlingvon. Ni same petas vin se eblas informi pri nia seminario kaj inviti viajn gekolegojn en viaj universitato, firmaoj, institutoj, fakaj organizoj, kiuj dezirus partopreni kaj prelegi nacilingve. Vi povus koncize traduki esperanten iliajn prelegojn kaj ankaŭ la diskutojn. Tiamaniere ili ankaŭ povus persone konatiĝi kun bulgaraj kaj eksterlandaj scienculoj kaj samfakuloj.

La ĉefa celo de nia seminario estas prezenti al la fakuloj tutmonde, ke Esperanto estas ne nur lingvo por kontaktoj kaj kunlaboro inter la esperantistoj, sed ke la fakuloj-neesperantistoj partoprenante nian seminarion povus mem kompreni kiamaniere Esperanto povus esti utila por iliaj internaciaj fakaj kontaktoj.

Temoj de la prelegoj

Diversaj sciencaj kaj fakaj prelegoj kunligitaj kun profesia agado de la prelegonto. La prelegonto povas prezenti koncize sian prelegon kaj poste estos diskutoj pri la temo. La plenan tekston de la prelego ni publikigos post la seminario en prelegaro. Ni petas la prelegontojn ĝis 25.05 sendi al ni resumojn de la prelegoj, ĉar ni dezirus disdoni ilin al la partoprenontoj en la komenco de la Seminario.

Seminariejo:

Internacia Universitato Karlovo. La Solena Inaŭguro estos en la urbodomo.



Situo de Karlovo

Karlovo estas situanta en la centro de Bulgario kaj estas facile atingebla de Plovdivo (60 km) kaj Sofio (150 km). Al la aliĝontoj ni sendos detalan horaron de la vagonaroj kaj busoj. Ni atendos la partoprenontojn en la stacidomo Karlovo kaj busstacio Karlovo.

Antaŭ- kaj postseminaria ripozo

Por la dezirontoj ni povus organizi la tranoktadon en Karlovo kaj ĉe la maro tre malmultekoste. Por tiuj kiu dezirus ripozi en Karlovo (ĉar kiel mi jam menciis ĝi estas situanta en la centro de la lando) ni povus organizi diversajn ekskursojn. Tiuj, kiuj ŝatas ekskursi al la montaro, povos tion fari ĉiutage, ĉar Karlovo estas situanta en la famekonata Roza Valo kaj je la piedo de la monto Stara Planina. En la komenco de junio (06-07.06.2009) estas la tradicia nacia festo de la Rozo en Karlovo kaj por tiuj, kiuj deziras veni pli frue ni aranĝos la tranoktadon en nia studenta domo.

Tranoktado: en studenta domo, privataj domoj kaj hoteloj.

Manĝado

Libervole en la universitata bufedo aŭ proksimaj manĝejoj kaj restoracioj. La nutrado en Bulgario estas tre malmultekosta. En la proksimaj manĝejoj kaj familiaj restoracietoj vi povas tag- kaj vespermanĝi je entute ĝis 8-10 eŭroj.

Aliĝo

La partoprenontoj petu kaj resendu al ni la aliĝilojn ĝustatempe. La aliĝkotizoj estos pageblaj surloke kune kun la tranoktado, sed ni deziras havi fruan informon kaj tiamaniere garantii la tranoktadon. Skribu rete al leonov(a)rozabg.com aŭ poŝte al Internacia Seminario, p.k. 44, 4300 Karlovo, Bulgario. Pli detalajn informojn vi povus ricevi skribante aŭ telefonante al mi : +359 885056469.

Nome de la Organiza Komitato,

Prof. Bojidar Leonov

Prezidanto de AIS-Bulgario, Rektoro de IUK kaj Vicprezidanto de BEA